WIKIPEDIA

Zulua lingvo

La **zulua** (*isiZulu*) estas la lingvo de la zuluoj, kun ĉirkaŭ 10 milionoj da parolantoj, la plejparto de kiuj (>95%) loĝas en la respubliko de Sud-Afriko. La zulua estas la plej vaste parolata afrikdevena lingvo en tiu lando. Laŭ Ethnologue (2005), 24% el la loĝantaro parolas ĝin, kaj pli ol 50% komprenas ĝin. Ĝi estas unu el la 11 oficialaj lingvoj de Sud-Afriko ekde 1994, kiam la apartisma sistemo falis.

La lingvo estas uzata ankaŭ en Bocvano, Lesoto, Malavio, Mozambiko kaj Svazilando.

La zulua estas aglutina lingvo de la subgrupo de nguni-lingvofamilio ene de la bantu-lingvoj. Malmulte oni scias pri la historio de la lingvo, ŝajnas ke ĝi ekzistas kiel lingvo ekde la 16-a jarcento.

La lingvokodo (ISO 639) estas "zu" aŭ "zul".

Zulua lingvo	
isiZulu	
Parolata en	Sud-Afriko, Bocvano, Lesoto, Malavio, Mozambiko, Svazilando
Parolantoj	11 milionoj
Skribo	latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Niĝerkonga lingvaro	
Benekonga lingvaro	
Bantoida lingvaro	
Bantua lingvaro	
Ngunia lingvaro	
Zulua	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Sud-Afriko
Reguligita de	Pan South African Language Board
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	zu
ISO 639-2	zul
ISO 639-3	zul
Glottolog	zulu1248
Angla nomo	Zulu
Franca nomo	zoulou

Enhavo

La lingvo
- Fonologio
- Substantivoj
- Verboj
- Ekzemploj

Literaturo

Eksteraj ligiloj

La lingvo

Fonologio

La zulua, kiel ankaŭ la kosa kaj la sesota (najbaraj nguni-lingvoj) kaj la piĝino Fanagalo uzas klaketojn. Tiu trajto ne estas kutima por bantuaj lingvoj. Ĝi estas rezulto de influo flanke de kojsanaj lingvoj.

La tri bazaj klaketoj de la zulua estas:

- c - klaketo denta, notita [ǀ]
- q - klaketo post-alveola, notita [ǃ]

- x - klaketo alveola flanka, notita [ǁ]

Ĉiu baza klaketo povas esti modifita per aspiro aŭ sonorigo, tiel la nombro de klaketoj multobliĝas.

Substantivoj

La zulua substantivo enhavas ĉefe du partojn, la prefikson kaj la radikon. La prefikso ebligas ordigon de la substantivoj en substantivgrupoj.

Kelkaj ekzemploj

- umuntu (homo), abantu (homoj)
- ugogo (avino), ogogo (avinoj)
- igama (nomo), amagama (nomoj)
- inhlanzi (fiŝo), izinhlanzi (fiŝoj)

Verboj

La zulua verbo enhavas, kontraŭe al la substantivo varian nombron de partoj, kiuj estas kunmetitaj laŭ indikita sekvo.

Simplaj verbradikoj ne enhavas aliajn sufiksojn kiuj modifos la signifon de la verbo. Inter alie:

- -w- (fali)
- -dl- (manĝi)
- -enz- (fari)
- -nqamul- (rompi)
- -os- (rosti)
- -siz- (helpi)

Pliigitaj verbradikoj devenas el simplaj verbradikoj post aldono de sufiksoj kiuj ŝanĝas la signifon. Tio estas montrita helpe de la verbradiko "-enz-" (fari) kaj de la plej komunaj aldonoj:

- -enz- (fari)
- -enzan- (fari iun kune)
- -enzek- (esti fareble)
- -enzel- (fari ion por iu)
- -enzis- (farigi)
- -enziw- (esti farita)

Ekzemploj

- Uyahamba. (Li iras.)
- Uhamba kusasa. (Li iros morgaŭ.)
- Akahambi. (Li ne iras.)
- Uyangisiza. (Li helpas min.)
- Ungisiza namhlanje. (Li helpas min hodiaŭ.)
- Akangisizi. (Li ne helpas min.)

Literaturo

- Derek Gowlett, Khethiwe Ngwenya, Tessa Dowling: *Speak Zulu With Us Beginner's Course.* African Voices (http://www.africanvoices.co.za/), Cape Town 1999, ISBN 0-620-24425-9
- Derek Gowlett, Khethiwe Ngwenya, Tessa Dowling: *Speak Zulu With Us Intermediate To Advanced.* African Voices, Cape Town, 2001, ISBN 0-620-27725-4
- George Poulos, Christian T. Msimang: *A Linguistic Analysis of Zulu (http://www.linx.co.za/zulu/#linguistic).* Via Afrika, Cape Town 1998, ISBN 0-7994-1526-X
- C. M. Doke: *English-Zulu/Zulu-English Dictionary (http://witspress.wits.ac.za/Catalogue/viewbook.asp?page=book&pk=514).* Witwatersrand University Press, Johannesburg 1990, ISBN 1-86814-160-8
- Wilkes, Arnett, *Zulu : a complete course for beginners / Arnett Wilkes and Nicholias Nkosi, Lincolnwood, Ill.* : NTC *Publising Group*, 1996 268 paĝoj kun bildoj, *(Teach yourself books)* originalo 1995 *by Hodder Headline, London*, ISBN 0-8442-3701-9
- *Zulu : a complete course for beginners / Arnett Wilkes and Nicholias Nkosi, London : Hodder Headline*, 1995, 268 paĝoj kun bildoj + 1 audikasedo *(Teach yourself books)* ISBN 0-340-63163-5 (originalo)

Eksteraj ligiloj

- esperante Informoj pri la Zulua lingvo (https://uea.org/vikio/kategorio:Zulua_lingvo) en la vikio de UEA (https://uea.org/vikio/Ĉefpaĝo)
- [1] (https://eo.wikibooks.org/wiki/Zulua) Baza Zulua-kurso ĉe Vikilibroj
- http://isizulu.net/ zulu-angla vortaro
- http://web.archive.org/19970416061941/www.lmp.ucla.edu/profiles/profz01.htm (malvalida ?)
- http://www.cyberserv.co.za/users/~jako/lang/zul.htm (malvalida ?)
- Funda Manje! (http://web.archive.org/20090727165624/www.geocities.com/funda_manje) (danĝera?)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Zulua_lingvo&oldid=6875154"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 14:58, 8 feb. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.